La antikva kaj mezepoka historio de Rusio
(2) La Mongola regado (la 2-a parto)

KATO Iĉiro

Ancient and Medieval History of Russia
(written in the international language of Esperanto)
(2) The rule of Mongles (part 2)

KATO Ichiro

<Enhavo>

(1) La mongola militiro al Orienta Eŭropo kaj Rusio
(2) La fondiĝo de Kipĉaka ĥanregno
(3) La mongola superregado sur Rusio
(la supraĵoj en antaŭa numero)
(la malsupraĵoj en tiu ĉi numero)
(4) La regado de Berke-ĥano kaj Mengu=Timuro ĥano
(5) La periodo de la duala regpotenco kaj rusaj princoj

(4) La regado de Berke-ĥano kaj Mengu=Timuro-ĥano

Batu-ĥano, la fondinto de Kipĉaka ĥanregno, rigardis sian unuan filon, Sartakon kiel sian sekvanton kaj sendis lin al Granda ĥano Mongke por ke la lasta legisitimus Sartakon.Fakte Mongke-ĥano legisitimis lin.Sed Berke-ĥano, la frato de Batu-ĥano, ekvolis akiri ĥantronon, ĉar Batu-ĥano mortis en 1256, kiam Sartako estis en Karakorumo.

Komence Berke-ĥano estis malavantaĝa, ĉar li kontraŭstaris al la volo de Batu-ĥano kaj al la legisitimo de Granda ĥano Mongke. Sed li havis la avantaĝojn, ke li mem estis islamano, male Sartako estis kristano(Nestoriusano). Lin subtenis la islamanaj komercistoj enoficigitaj kiel impostkolektistoj, kaj la islamanaj ekleziuloj en Ĥorazmo kaj Volga Bulgario,kiuj tiutempe estis potencaj sociaj grupoj. Krome, li havis egalan rajton je ĥantrono kun Sartako en tiutempa mongola socio, kie ankoraŭ ne establis la principo pri la sistemo de la unua filo-heredo.

Sartako fariĝis Kipĉaka ĥano, sed subite mortis en 1257. Granda ĥano Mongke, estante fidela al la volo de sia amiko, Batu-ĥano, enoficigis Ulagučon, la filon(aŭ la fraton) de Sartako kiel Kipĉakan ĥanon kaj nomumis Borakŝinon, la vidvinon de Batu-ĥano kiel regentinon. "Granda ĥano Mongke sendis siajn emirojn (al Kipĉaka ĥanregno). Li amoplene traktis la edzinojn, filojn, fratojn de (Batu-ĥano) kaj ordis ke Borakŝino, la unua edzino de Batu-ĥano ordu kaj eduku Ulagčon, la filon de Sartako ĝis la tempo, kiam Ulagučo fariĝis matura kaj surtroniĝis kiel la sekvanto de lia patro." ("La historio de la mondkonkerinto") Sed la batalo por ĥantrono ne finiĝis, ĉar tiu Ulagučo ankaŭ subite mortis (1257). La regentino Borakŝino volis surtronigi Tuda = Mengon, la filon de Tugano(la dua filo de Batu-ĥano) por konservi la rektan familian linion de Batu-ĥano,sed alfrontis la reziston de la subtenantoj de Berke-ĥano. Estinte izolita en Ĵuča familio, Borakŝino petis la subtenon de Hulagu-ĥano, Ila ĥano en Percio. Ŝia intriogo ne sukcesis kaj ŝi mem estis mortigita. Sed

tiu okazintaĵo fariĝis la malrekta kaŭzo de la konflikto inter Berke-ĥano kaj Hulagu-ĥano, kiu poste evoluis kiel la cent jara milito inter ambaŭ mongolaj ĥanregnoj. Estis verŝajne en 1258, ke Berke-ĥano surtroniĝis.

Berke-ĥano jam kredis Islamon antaŭ sia surtroniĝo. Do sia surtroniĝo kaŭzis la disvastiĝo de Islamo en la ĥanregno, kaj aperis islamanoj inter mongolaj nobeluloj,kiuj antaŭe kredis tradician ŝamanismon.Sed, tiuj mongolaj nobeluloj, kiuj volis konservi nomadan vivon, malnovajn kutimojn kaj kredojn, malŝatis la penetriĝon de Islamo reprezentanta urban kulturon. Il konsideris la akcepton de Islamo kiel la atencon de sia rajto kaj la kreskiĝon de la centra potenco de Kipĉaka ĥano. Sed Islamo konstante penetriĝis en la ĥanregno kaj akiris potencan pozicion en ĝi.Rezulte samtempe penetriĝis la altnivela araba kulturo en la ĥanregno, kaj inter popoloj disvastiĝis Islamo, kiu predikis ilin ke ili devas submetiĝi al ĉiopova Alaho, lia surterena agento =ĥano kaj la regantaro. Tial la potenco de la ĥanregna regantaro stabiliĝis.

Kipĉaka ĥanregno estis la parto de Mongola mondimperio, kaj Kipĉakaj ĥanoj estis la subuloj de Grandaj ĥanoj. Kvankam Batu-ĥano estis la fakta reganto de la okcidenta parto de Mongola mondimperio kiel la plejaĝulo de Ĵuĉa familio kaj la akimo de Granda ĥano,li formale submetiĝis al Granda ĥano, kiel montris la fakto, ke li sendis Sartakon al Granda ĥano por ke la lasta legisitimus Sartakon kiel la sekvanton.

Sed, en la regado de Berke-ĥano disfalis la regant-dependa

rilato inter Mongola mondimperio kaj Kipĉaka ĥanregno, la supersinjor-vasala rilato inter Granda ĥano kaj Kipĉaka ĥano. Post la morto de Granda ĥano Mongke (1259) tion kaŭzis la batalo por Granda ĥana trono inter Ĥubilai, la frato de Granda ĥano kaj Arik=Bugao, la plej juna frato de li. La subtenantoj de Ĥubilai-ĥano okazigis sian ĥuriltaion en norda Ĉinio kaj surtronigis lin. Aliflanke la subtenantoj de Arik=Bugao en Karakorumo surtronigis lin.

Kipĉaka ĥano Berke subtenis Arik=Bugaon, dume Ila ĥano Ĥulagu sian fraton Ĥubilai-ĥanon. Do konsiderante tiun konflikton el la vidpunkto de Mongola mondimperio, ni povas konkludi, ke Ĉinio kaj Irano kun alta civilizacio kontraŭstaris al Volga stepo kaj Mongolio kun tradicia nomada vivo.

Fin fine tiu konflikto finiĝis kiel la venko de Ĥubilai-ĥano, kaj li fariĝis Granda ĥano. Sed Berke-ĥano ne agnoskis la aŭtoritaton de Ĥubilai-ĥano. Normale, la ĥanregnaj moneroj estis stampitaj de la nomoj de Granda ĥano (Mongke, kaj Arik-Bugao en la periodo de la konflikto) por montri ĝian aŭtoritaton. Berke-ĥano, tamen, ne stampis la nomon de Ĥubilai-ĥano, kvankam la lasta fariĝis Granda ĥano. Sur siajn monerojn Berke-ĥano stampis la nomon de Bagdada Kalifo por montri ke li ne submetiĝos al Granda ĥano Ĥubilai, sed volos submetiĝi al nur la religia aŭtoritato de Kalifo.Kiam la senditoj aŭ reĝoj de Georgio kaj Rumo venis al Sarai por vasalĵuri al Mongla mondimperio, Berke-ĥano ne sendis ilin al Karakorumo (ekzemple,Georgia reĝo Davido IV).

Tiel sub la regado de Berke-ĥano la ĥanregno politike

sendependiĝis de Juan-dinastio. Sed ne komplete estis rompita la rilatoj inter ambaŭ ĥanregnoj.Post la regado de Berke-ĥano, Granda ĥano Ĥubilai legistimis Mengu=Timuro-ĥanon kaj Tuda=Mengu-ĥanon, kaj Uzbek-ĥano sendis senditojn por postuli la enspezon de sia lando en Ĉinio. Sed tio estis nur formala. Granda ĥano jam ne havis la politikan aŭtoritaton, kiun Granda ĥano Gujuko havis en la politika kampo de Kipĉaka ĥanregno.

Ila ĥanregno en Persio kaj Kipĉaka ĥanregno publike eniris en militan konflikton en 1262, kvankam ambaŭ ĥanregnoj estis mongolaj landoj (Berke-ĥano kaj Hulagu-ĥano estis nepoj de Ĝingis-ĥano kaj kuzoj). La kialo de tiu konflikto estis la distribua problemo pri la enspezo de konkeritaj landoj kaj la landa problemo de Azerbajĝano. Ambaŭ ĥanregnoj ekbatalis, kiam Berke-ĥano sendis 20000 trupojn komanditajn de Nogai (poste li fariĝis politika eminentulo en la ĥanregno), kaj Ila ĥanregno batalis kontraŭ tiuj trupoj renkontire. Tiu milito longtempe daŭris en la periodo de ĉirkaŭ 100 jaroj, eĉ post ambaŭ ĥanoj mortis (Hulagu-ĥano en 1265,Berke-ĥano en 1266). Ĝi malfortigis ambaŭ hanregnojn kaj grande influis al la internaciaj rilatoj en la mondo de orienta Mediteraneo (Egiputio, Bizanca imperio, Venecio, Ĝenevo ktp.).

En la rilatoj inter ambaŭ ĥanregnoj gravan pozicion milite kaj politike havis Mamuluk-dinastio, kiu tiutempe kontrolis Egiputon kaj Sirion. Kiam en Irano peretris Ila ĥanregno,ĝi ekminacis la orientan landlimon de Mamuluk-dinastio, kiu jam disvasitigis sian teritorion ĝis Araba Duoninsulo en la lasta periodo de la 13-a

jarcento.La trupoj de Ila ĥanregno invadis Sirion kaj batalis kontraŭ tiuj de Mamuluk-dinastio en Ain=Ĝaruto norde de Jerusalemo. Venkite komplete tie, Ila ĥanregno volis kunigi milite kun Krucarmeo de okcidenta Eŭropo por kontraŭstari al komuna malamiko, Islama ŝtato.Aliflanke, Kipĉaka ĥanregno ankaŭ kontraŭstaris al Ila ĥanregno. Tiamaniere naskiĝis la ebleco kunigi Kipĉakan ĥanregnon kun Mamuluk-dinastio surbaze de komuna religio=Islamo kontraŭ Ila ĥanregno favoranta al Nestoriusa Kristanismo. Jene diris la letero de Baibarso, la sultano de Mamuluk-dinasito al Berke-ĥano en 1263. "Mi estas la amiko de ortodoksa kredo, male tiu malamiko Hulagu estas pagana.Hulagu maliĉe persekutis islamanojn kaj prirabis iliajn landojn. Mi konsideras, ke mi antaŭeniru al Hulagu, kaj vi antaŭeniru al Hulagu. Ni samtempe ataku Hulagu-ĥanon kaj elpelu lin el tiu lando. Mi transdonos al vi ĉiujn islamanajn landojn, kiujn nune kontrolas Hulagu." Tiu letero evidente montras la karakteron de la alianco inter ambaŭ ŝtatoj. Pere de tiu lereto ambaŭ ŝtatoj alianciĝis kaj de tiu tempo havis tre amikajn rilatojn. Krome, pro la kreskiĝo de la reciprokaj rilatoj inter Kipĉaka ĥanregno kaj Mamuluk-dinastio penetris la araba islama kulturo, kiu estis tiutempe plej evoluinta. Kaj al Mamuluk-dinastio kiel sklavojn oni vendis multajn rusojn kaptitaj en punaj militiroj de la ĥanregno.

Kiel dirite antaŭe, Berke-ĥano politike interesiĝis ne je Rusio, sed je la konflikto en Mongola mondimperio kaj je la invada politiko direkte al Azerbajĝano. Sed li devis alfronti la

kontraŭmongolan movadon de la princo Daniilo Romanoviĉ en sudokcidenta Rusio kaj la popolan ribelon kontraŭ la ĥanregna superregado en nordorienta Rusio. Daniilo Romanoviĉ estis la princo de Galic=Voluinio kaj la ĉampiono de sudokcidenta Rusio. Li malgraŭvole submetiĝis al Batu-ĥano, sed sub la regado de Berke-ĥano komencis kontraŭbatali al la ĥanregana superregado. Li fikse rigardis Litovion, kiu tiutempe pli kaj pli fortiĝis sude de Rusio.

Litovio sukcesis unuiĝi sub la princo Mindaukaso kaj en la 1240-aj jaroj ekinvadis Rusion pro la dumtempa malfortiĝo de Germana Kavalerio. En 1250-aj jaroj li kontrolis kelkajn urbojn de "Nigra Rusio", kiu estis norde najbara lando de la princregno Voluinio. Minacite de Germana Kavalerio okcidente kaj de la invado de la ĥanregnaj trupoj oriente, tiuj urboj bonvenigis Litovion kun forta armeo. La princo Mindaukaso sukcesis mildigi la sudan minacon de Germana Kavalerio pere de sia konvertiĝo al Romana Katoliko kaj la aldono de la parto de Ĝimuto al ĝi. Kaj li volis plibonigi rilaton kun la princregno Galic=Voluinio, kiu estis oriente najbara lando.

Daniilo de Galic=Voluinio bezonis aliancanon por kontraŭstari al la ĥanregno.Mindaukaso komprenis la dumtempecon de la paco kun la suda minaco, Germana Kavalerio.Do la traktado pri alianciĝo estis facila.Unue Daniilo geedziĝis kun la nevino de Mindaukaso en ĉirkaŭ 1251. Kaj Vojŝelko, la filo de Mindaukaso konvertiĝis al Greka Ortodokso por solvi la religian problemon inter Roma Katoliko kaj Greka Ortodokso.En 1254 Daniilo kaj

Mindaukaso subskribis la pacan pakton pere de Vojšelko. Laŭ tiu pakto Mindaukaso aldonis "Nigran Rusion" al Romano, la filo de Daniilo, kaj Romano fariĝis la vasalo de Mindaukaso. Kaj la filino de Mindaukaso (la fratino de Vojšelko) geedziniĝis kun Šilvano, la frato de Romano, kaj Vojšelko eniris en Greka Ortodoksa templo.

Litovio kaj Galic=Voluinio alianciĝis pro la geedziĝaj rilatoj kaj la solvo de religiaj problemoj. Tio rezultis, ke la fortaj kontraŭmongolaj potencoj aperis en suda landlima teritorio de Rusio.

Kompare kun nordorienta Rusio, la mongola superregado sur sudokcidenta Rusio estis malfirma. Sed la ĥanregno volis plifirmigi ĝin, dum Daniilo kaj Mindaukaso alianciĝis. Estis malmultaj, tamen, la trupoj de Kuremso, la komandanto de la ĥanregna okupanta armeo. Kvankam Kuremso estis ordonita puni la princregnon Galic=Voluinion, li ne sukcesis plenumi tiun taskon, ĉar jam kompletiĝis la preparo de kontraŭbatalo de Daniilo, kiu sukcesis alianciĝi kun Litovio.

Informite pri la malsukceso de Kuremso, Berke-ĥano sendis al sudokcidenta Rusio kaj Litovio fortajn trupojn komanditajn de brava ĝeneralo Burundaj. Li komprenis,ke la leviĝo de Litovio fariĝus la minaco kontraŭ la ĥanregna superregado sur Rusio. Lia celo estis, ke li povus apartigi la princojn de sudokcidenta Rusio inkluzive de Daniilo for de Litovio, kaj detrui la aliancon inter Litovio kaj Galic=Voluinio. Kompreninte lian celon, ĝeneralo Burundaj devigis la princojn de sudokcidenta Rusio partopreni en

la militiron de la ĥanregno al Litovio.Tiun demandon ne povis rifuzi la princoj de sudokcidenta Rusio, konsiderinte pri la superforta milita potenco de la ĥanregnaj trupoj. Ekzemple Vasiliko, la frato de Daniilo, ekde Berestio de Voluinio rapide iris al ĝenaralo Burundaj, prirabante la litoviajn landojn. Daniilo mem invadis "Nigran Rusion" kontrolitan de Litovio, kvankam li mem ne rekte partoprenis en la militiron de Burundaj al Litovio. Ni povas konstati, ke sukcesis la politiko de la ĥanregno por apartigi sudokcidentan Rusion for de Litovio, ĉar Vojŝelko de Litovio kaj Tovĉivilo mortigis Romanon, la filon de Daniilo. Krome Burundaj ordonis detrui fortikaĵojn de la gravaj urboj en sudokcidenta Rusio. La princoj de sudokcidenta Rusio devis akcepti tiun ordon kaj detrui fortikaĵojn en Danilovo, Rutsko, Vladimiro de Voluinio.

La militiro de ĝeneralo Burundaj komplete milite kontrolis sudokcidentan Rusion kaj nuligi ĝian kapablon rezisiti kontraŭ la ĥanregna superregado. Tio rezultis, ke same kiel nordorienta Rusio, sudokcidenta Rusio, kiu kelkfoje rezistis kontraŭ la ĥanregna superregado en la periodo de Batu-ĥano kaj konservis sendependecon kompare kun nordorienta Rusio, fin fine fariĝis la komplete dependa lando de la ĥanregno. La princoj de sudokcidenta Rusio ankaŭ bezonis "jarlikojn" de Kipĉaka ĥano por akiri princtronon. Baskakoj kaj Dargaĉoj estis enoficigitaj en diversaj lokoj de sudokcidenta Rusio. En 1264 Daniilo Romanoviĉ mortis, malesperinte.

Post la kontraŭmogola movado en sudokcidenta Rusio estis

subpremita, eksplodis la ribelo kontraŭ la ĥanregna superregado en Vladimiro, Rostovo, Suzudalo. Jaroslavlo de nordorienta Rusio. La centro de la ribelo estis ne Vladimiro, kiu multe suferis pro la militiro de Batu-ĥano, sed Rostovo. La bazpunkto estis la popola kunveno de la urbo. Tie popoloj kolektiĝis kaj turnis sian indignon, unue kontraŭ la ĥanregnaj impostkoletistoj. La plimulto de ili estis islamaj komercistoj el Centra Azio. Ili tiutempe estis la simbolo de la opresa regado de la ĥanregno, ĉar ili pruntedonis monon procentege al tiuj, kiuj ne povis pagi imposton, kaj vendis debitorojn kiel sklavojn. La plej malbonfama el tiuj impostkolektistoj estis Zosimao de Jaroslavlo. Pri li rusa dokumento diris, "Li antaŭe estis kristano kaj ekleziulo, poste konvertiĝis al Islamo por pliamikiĝi kun Baskakoj de ĥano.Same kiel apostato, li malbone diris sian antaŭan kredon kaj siajn fratojn...Estis damninde, ke li persekutis sian kamaradojn." Fin fine popoloj mortigis lin.

Berke-ĥano sendis punajn trupojn al la popola ribelo en Suzudalio kaj subpremis ĝin. Sed tiu ribelo kaŭzis la ŝanĝon de la ĥanregna regadmaniero. Mengu=Timuro-ĥano, la sekvanto de Berke-ĥano abolis impostkolektadon per islamaj komercistoj kaj enkondukis rektan impostkolektadon per ĥanregnaj oficistoj.

Berke-ĥano mortis en 1266, kaj Mengu=Timuro-ĥano, la nepo de Batu-ĥano fariĝis lia sekvanto.

La mongolaj konkerintoj alprenis la politikon de religia toleremo,kiel "Jasao" de Ĝingis-ĥano diris, "Li (Ĝingis-ĥano) decidis, ke ni ne gravigu kiajn ajn kredojn kaj aprecu ĉiajn kredojn."

Kunescepte, Kipĉakaj ĥanoj estis fidelaj al tiu direktivo de "Jasao". Kredante kian ajn kredon, ili ne devigis siajn subulojn kredi sian kredon kaj ne persekutis aliajn kredojn.Batu-ĥano kredis tradician ŝamanismon, kaj lia filo Sartako estis Nestriusana kristano.Fakte Berke-ĥano konvertiĝis al Islamo, sed lia sekvanto Mengu=Timuro-ĥano konvertis sian filinon al Kristanismo kaj geedzinigis al la rusa princo Jaroslavo. Kvankam Uzbeko estis fama kiel islamano, li ne aplikis regore Islamon al la ŝtatregado, sed konservis malnovajn kutimojn.

Kipĉaka ĥanregno esceptigis rusan eklezion kaj ĝiajn landojn kiel la objektojn de la censo, t.e, kiel la impostobjektojn, ekregante Rusion. Mengu=Timuro-ĥano formiligis tiun politikon de religia toleremo en la domukento. Laŭ la "jarliko", kiun li donis al "la rusaj episkopoj kaj ĉiuj ekleziaj homoj",oni esceptigis ekleziajn landojn kaj laborantajn tie homojn kiel la impostobjektojn, kaj ne devigis ekleziulojn servi milite.Kaj oni malpermesis ĥanregnajn oficistojn interveni je ekleziajn landojn kaj postuli kiajn ajn servojn de ekleziuloj. En la posta periodo, kiam Ivano IV provis limigi ekleziajn landojn, li alfrontis grandan reziston. Dirante, "eĉ paganaj ĥanoj rabis nenion de sanktaj preĝejoj kaj monaĥejoj, kaj ne transdonis landojn...Ili aldonis jarlikojn al sanktajn episkopojn, kaj prohibis iujn ataki kaj pribabi landojn de preĝejoj kaj monaĥejojn", Patriarko Makalij kontraŭstaris al la politiko de Ivano IV.Tiamininere la ĥanregna politiko de religia toleremo tre impresis rusajn ekleziulojn.

Tiu protektpolitiko por rusa eklezio malfortigis la kontarŭmongolan

senton inter la rusoj kaj faciligis la ĥanregnan superregadon sur Rusio, ĉar ĝi mallongtempe garantiis la submetiĝon de rusaj ekleziuloj, kiuj havis moralan aŭtoritaton inter la rusoj. Sed longtempe ĝi malfortigis la ĥanregnan superregadon sur Rusio, ĉar ĝi politike kaj ekonomie fortigis rusan eklezion kaj igis lin la bazo de la centralizacio de Rusio. Ne fariĝinte impostobjektoj, rusa eklezio kresis ekonomie, kaj poste fariĝis la sola organizaĵo de ĉiu Rusio, kiu tiutempe dividiĝis politike.

Dum bone evolui sukcesis Kipĉaka ĥanregno sur la regado de Mengu=Timuro-ĥano, la situacio de Centra Azio fariĝis malstabila. Ĥaiduo, la nepo de la dua Granda ĥano Ugedei ne agnosikis la supersinjorecon de Ĥubilai-ĥano kaj ekrezisis kontraŭ lia regado. Granda ĥano Ĥubilai enoficigis Barakon, la pranepon de Ĉagatai kiel Ĉagataian ĥanon kaj kontraŭastarigis lin al Ĥaiduo.

En la milito inter Ĥaiduo kaj Barako en Centra Azio, Mengu=Timuro-ĥano subtenis, unue Barakon, poste Ĥaiduon. Li interesiĝis ne je tio, kiu venkos Barako aŭ Ĥaiduo, sed je nur la profitoj de Kipĉaka ĥanregno. Konkrete, li interesiĝis unue je tio, ke tiu milito ne ruiigus la landon de Transoksiano inkluzive de Samarkando kaj Buĥaro, kie trairis la grava komerca vojo inter la oriento kaj la okcidento. Fakte la karavana komerco kun la oriento multe damaĝiĝis, kiam Barako helpita de Meng = Timuro - ĥano konkeris tiun ĉi landon.

Ĥaiduo kun 50000 helpaj trupoj disrompis Barakon. En 1269 printempe, ĥuriltaion okazigis la reprezentantoj de Kipĉaka ĥanregno, Ĉagataia ĥanregno de Barako kaj Ugedeia ĥanregno de

Ĥaiduo. Tio rezultis, ke tiuj tri ĥanregnoj promesis interpaciĝi kaj dividigis la landon de Transoksiano je si.Ili elektis Ĥaiduon kiel "Grandan ĥanon de Centra Azio" kaj alianciĝis kontraŭ Ila ĥanregno. Tiu ĉi alianco montris, ke tiuj tri ĥanregnoj komplete apartiĝis de Juan-dinastio kaj Ila ĥanregno, kiujn regis la familio de Tului-ĥano el la vidpunkto de la familio de Ĝingis-ĥano.

En la lasta periodo de 1270-aj jaroj Mengu=Timuro-ĥano militiris al Kaŭkazo, la Jasoj kaj la ĉerkesoj. En tiu militiro partoprenis multaj rusaj princoj, kiuj jam vasaljuris al la ĥanregno. En februaro de 1277 la ĥanregnaj trupoj konkeris Dedjakovon, la urbon de la Alanoj.Anstataŭ Dedjakovo sur la okcidenta bordo de Terek-rivero, Mengu=Timuro-ĥano konstruis novan Dedjakovon sur la orienta bordo. Tiu urbo kun la urbo Maĝaro fariĝis la centro de la ĥanregna superregado sur Kaŭkazo.

(5) La periodo de la duala regpotenco kaj rusaj princoj

Post la morto de Mengu = Timuro-ĥano (1282), Nogaio (signifanta "hundon") akiris saman aŭtoritaton kiel Kipĉaka ĥano. Do venis la periodo de la duala regpotenco kun du centroj de Kipĉaka ĥano kaj Nogaio. Denove la dekstra flanko de la ĥanregno=la "uluso" de Batu-ĥano dividiĝis je la dekstra parto kaj la maldekstra.

Kvankam Nogaio ne devenis el la rekta familia linio de Ĵuĉa familio, li estis la pranepo de Ĵuĉ-ĥano, kaj sub la regado de Mengu=Timuro-ĥano laboris kiel la armkomandanto en la milito

kontraŭ Ila ĥanregno.Mamuluk-dinastio kaj Bizanca imperio rigardis lin kiel potencan eminentulon egalan al la Kipĉaka ĥano. Li estis "Bekljaribeko" (plej aĝa Beko, kiu havis rajton komandi armeon kaj trakti diversaj problemojn kun fremdlandoj). Kune kun alta pozicio,li havis vastan landon ekde Danubo ĝis la sudrusia stepo sur la norda marbordo de Nirga Maro.Lia komandejo troviĝis en Mordavio.

Akirinte fortan potencon sur la malsupra baseno de Danubo, Nogaio intervenis je la sekvanta problemo post Mengu=Timuro-ĥano, kaj sutronigis Tuda=Mengu-ĥanon, la fraton de Mengu=Timuro-ĥano anstataŭ Tolebogao-ĥano, la nevo de Mengu=Timuro-ĥano,kiun oni konsideris kiel la sekvanton. Sed Tuda=Mengu-ĥano tro interesiĝis je religio kaj sabotis ŝtatpolitikon, kaj fin fine rezignis ĥantronon en 1287. Tiam Tolebogao-ĥano surtroniĝis.

Estis nature, ke nova ĥano Tolebogao kontraŭstaris al Nogaio, kiu subtenis Tuda=Mengu-ĥanon.Tolebogao planis mortigi Nogaion. Sed informite pri tiu intrigo, Nogaio arestis Tolebogaon kaj transdonis lin al Toĥtao,la filo de Mengu=Timuro-ĥano. Toĥtao mortigis Tolebogon kaj lian filon, ĉar Nogaio sugestis ke Mengu=Timuro-ĥano estis mortigita de Tolebogao. Toĥtao surtroniĝis en 1291.

Kvankam Toĥtao surtroniĝis kun la granda helpo de Nogaio, li estis tre energia homo kaj ne konsideris sin kiel nur "politikan pupeton" de Nogaio. Male li provis elmini Nogaion kaj denove unuigi Kipĉakan ĥanregnon.Kiam Toĥtao sendis siajn trupojn al

la lando de Nogaio,ambaŭ trupoj batalis proksime de Jasa (Plut)-rivero en 1297/1298.Nogaiaj trupoj kun 200000 rajdistoj disrompis tiujn de Toĥtao.Toĥtao pene eskapis (la unua batalo).

Venkinte en la unua batalo, Nogaio sendis siajn trupojn al Krimea Duoninsulo, la grava komerca bazo de Nigra Maro, kiun monopolis la Ĝenevanoj. La Venecianoj, la rivalo de la Ĝenevanoj volis rompi tiun monopolion kun la helpo de Nogaio.Nogaio sendis sian bofilon Akdanon al Krimeo kaj farigis lin impostkolekti tie.Sed la Ĝenevanoj en la urbo Kaffo mortigis lin.Ofendiĝinte de tio,Nogaio sendis multajn trupojn al Krimeo kaj farigis ilin prirabi grandajn urbojn inkluzive de Kaffo kaj Sudako.

Sed la imperio de Nogaio spertis seriozan krizison en sia kulmina periodo, ĉar komenciĝis la konflikto pri la militakira distribuo inter Nogaio, tri filoj (Ĝekeo, Tekeo, Turaio) kaj la Nogaiaj emiroj.El la flanko de Nogaio,multaj emiroj kaj 30000 rajdistoj transiris al tiu de Toĥatao.

Utiligante tiun ŝancon, Toĥtao denove ekbatalis kontraŭ Nogaio. La dua batalo okazis apud Kagamlik-rivero en 1299/1300. Kaj Toĥatao venkis.Oni diris, ke Nogaio estis mortigita de iuj rusaj soldatoj.

Post la morto de Nogaio, liaj filoj klopodis defendi la landon de Nogaio, sed okazis la sekvanta konflikto inter du filoj, Ĝekeo kaj Tekeo. Tekeo estis mortigita de Ĝekeo. Ĝekeo kun restantaj trupoj de Nogaio, eniris unue en Mordavio, poste en Bulgario. Georgo Tertero, antaŭa imperiestro de Bulgario rigardis ne Kipĉakan ĥanon, sed Nogaion kiel sian supersinjoron, kaj geedzinigis sian

filinon al Tekeo.Smileso, tiutempa imperiestro de Bulgario komplete dependis de Nogaio. Kiam Bulgaria imperiestro Smileso mortis en 1298,kun la konsento de Svjatslavo, la filo de autaŭa imperiestro Tertero, surtroniĝis Ĝekeo el la familio de Nogaio, kiu havis fortan influon en Bulgario. Sed lia regado estis mallongtempa, ĉar lin perfidis, arestis kaj mortigis Svjatslavo timanta la atakon de Toĥtao. Kaj Svjatslavo mem surtroniĝis.

Restanta Turaio el tri filoj de Nogaio planis ribeli kontraŭ Toĥtao en 1301／1302, kunlaborante kun Sarai=Bugao, kiun Toĥtao enoficigis kiel sian agenton en autaŭa lando de Nogaio. Estante la frato de Toĥtao, Sarai=Bugao havis ambicion anstataŭigi lin kaj mem surtroniĝi. Sed tiu intrigo aperigis sin, kaj Turaio kaj Sarai=Bugao estis mortigitaj de la trupoj de Toĥtao.

Tiamaniere pereis la familio de Nogaio. Toĥtao dividis autaŭan landon de Nogaio je siaj du filoj, Tukul=Bugao kaj Il=Bazaro. La lando de Nogaio fariĝis sendependa ekde la periodo de Mengu=Timuro-ĥano. Nune ĝi, nome, la dekstra flanko de la "uluso" de Batu-ĥano, denove eniris en la superregado de Kipĉaka ĥano.

Unuiginte la ĥanregnon, Toĥtao komencis reformi la monan sistemon en 1310／1311. Antaŭ ol tio, en diversaj ekonomiaj lokoj (Krimeo, Volga Bulgario, la malsupra baseno de Volgo) oni uzis diversajn kaj loke proprajn monojn, kiuj havis diversajn formojn kaj valutojn. La mona reformo de Toĥtao enkondukis "Dirhemon" de Sarai, kie ĝi estis muldita laŭ fiksita peza normo.Rezulte, en la ĥanregna ekonomio la pozicio de Sarai kiel

la centro de muldado leviĝis, samtempe la centra regpotenco de Kipĉaka ĥano kreskiĝis.

La situacio ke en la supersinjora lando=Kipĉaka ĥanregno aperis du politikaj centroj de la ĥano kaj Nogaio, tre influis al rusaj princoj, kiuj tiutempe batalis por siaj landoj kaj tronoj.

Post la morto de granda princo Vasilij Jaroslavič (1276), la trono transiris al Dmitrij Aleksandrovič, la filo de Aleksandr Nevskij.Sed Dmitrij neglektis akiri la favoron de supersinjora Kipĉaka ĥano, interesiĝante nur je la grandigo de sia potenco. Aliflanke, Andrej Aleksandrovič, la frato de Dmitrij diligente servis al Mengu=Timuro-ĥano. Kiam Mengu=Timuro-ĥano militiris al Kaŭkazo en 1277, Andrej rapide partoprenis en tiu militiro kun Rostova princo Boris Vasilikovič, Belozela princo Greb Vasilikovič, Jaroslava princo Fedor Rostislavič ktp.

Kiam Mengu=Timuro-ĥano mortis kaj Tuda=Mengu-ĥano surtroniĝis, Andrej tuj iris al la ĥanregno por akiri la grandan princan tronon, dum Dmitrij okupiĝis nur je la konflikto kun Novgorodo. Rezulte, Tuda=Mengu-ĥano aldonis la grandan princan tronon al Andrej, kiu delonge servis al la ĥanregno. Revenis hejmen Andrej kun la ĥanregnaj trupoj komanditaj de ĝeneraloj Kavgadejo kaj Altudaio. Li atakis Dmitrij-on en Pereslavlo.

Se antaŭe, Dmitrij devus akcepti la decidon de Kipĉaka ĥano, ĉar supersinjora ĥano enoficigis Andrej-on kiel grandan princon. Sed nune Dmitrij provis akiri la protekton de Nogaio, ĉar tiutempe ekzistis alia eminentulo Nogaio en la ĥanregno. Ankaŭ Nogaio volis kontroli Rusion, utiligante Dmitrij-on, por kontraŭstari

al Kipĉaka ĥano.Sub la fono de tiu situacio rusaj princoj dividiĝis je la subtenantoj de Nogaio=Dmitrij kaj tiuj de la ĥano=Andrej. Tvera princo Miĥailo kaj Moskva princo Daniilo aliĝis al la unua, dum Rostova princo Boris, Belozela princo Greb kaj Jaroslava princo Fedor al la lasta.

En 1283 Dmitrij revenis hejmen kun la helpaj trupoj de Nogaio.Andrej devis interpaciĝi kun li kaj koncedi grandan princan tronon al li.Sed en 1285 Andrej atakis Dmitrij-on, denove helpite de la ĥanregnaj trupoj. Dmitrij kune kun la trupoj de Nogaio kaj la aliancaj princoj (Tvera princo Miĥailo kaj Moskva princo Daniilo ktp.) kontraŭatakis kaj disrompis Andrej-on.

Tiamaniere en nordorienta Rusio sub la regado de Tuda = Mengu-ĥano kaj Tolebogao-ĥano grandan princan tronon daŭre konservis Dmitrij subtenita ne de Kipĉaka ĥano, sed de Nogaio. Sed post Toĥtao surtroniĝis kaj ekbatalis kontraŭ Nogaio, la rusa politika situacio ŝanĝiĝis, ĉar li ne estis kontenta je tio, ke en Rusio, nome la dependa lando de la ĥanregno grandan princan tronon konservis Dmitrij subtenita de Nogaio, kaj do li ne povis politike influi al tiu lando. Toĥtao aldonis grandan princan tronon al Andrej, la rivalo de Dmitrij, kaj sendis al nordorienta Rusio la ĥanregnajn trupojn komanditajn de sia frato Tudano por milite subteni siajn rusajn princojn. Tiuj punaj militiraj trupoj prirabis Vladimiron, Moskvon, Kolomnon kaj aliajn urbojn. Rezulte, granda princo Dmitrij devis eskapi al Puskovon.

La ĥanregnan superregadon sur Rusio malfortigis tio, ke en Kipĉaka ĥanregno ekzistis du centroj de ĥano kaj Nogaio, kaj

ambaŭ batalis.Jam sub la regado Mengu=Timuro-ĥano oni abolis la impostkolektan sistemon per islamaj komercistoj. Sub la regadoj de Tuda=Mengu-ĥano, Tolebogao-ĥano kaj Toĥtao-ĥano malaperis ĥanregnaj impostkolektistoj, kiuj estis enofocigitaj anstataŭ islamaj komercistoj, kaj rusai princoj mem impostkolektis. Dmitrij mem impostkolektis kaj sendis imposton al Nogaio, kaj Tvera princo Miĥailo (poste granda princo) mem impostkolektis kaj sendis al la ĥanregno.ĤAnoj kaj Nogaio aldonis la prerogativon, nome la rajton impostkolekti al rusaj princoj por akiri liajn subtenojn (la trupoj de rusaj princoj estis ne malgravaj militpotencoj, kiel montris la fakto,ke Nogaio estis mortigita de rusaj soldatoj.)

Unuiginte la ĥanregnon, Toĥtao klopodis rekonstrui la ĥanregnan superregadon sur Rusio, kiu estis malstabila en la periodo de la duala regpotenco de la ĥanregno.

En 1293-94 la ĥanregnaj trupoj komanditaj de Tudano militiris al nordorienta Rusio.Rezulte, la princoj de Nogaio=Dmitrij devis akcepti la decidon de Toĥtao. Kaj ĉiuj princoj en nordorienta Rusio aprobis Andrej-on kiel grandan princon de Vladimiro en 1294. Sed en tiu ĉi tempo Nogaio restis kiel emimentulo, kaj Toĥtao ne povis komplete submetigis la rusajn princojn de Nogaio. Pro tio la rusa politika situacio ne estis stabila. Toĥtao devis stabligi ĝin por prepari la batalon kontraŭ Nogaio. Li sendis la senditon Nevluion kaj farigis rusajn princojn kunveni en Vladimiro en 1297. Kvankam la ĥana sendito sidis en tiu kunveno, rusaj princoj disputis inter si. Ili dumtempe kompromisis

pere de Vladimira episkopo Simeono kaj Saraia episkopo Izmajlo.

La konfliktojn inter rusaj princoj, tamen, ne povis haltigi la princa kunveno en Vladimiro.Granda princo Andrej ne observis la kompromison de la kunveno kaj sendis trupojn kaj provis rabi Perejaslavolon, kiu estis la lando de Ivano Dmitrievič,la filo de antaŭa granda princo Dmitrij. La trupoj de Moskva princo Daniilo kaj Tvera princo Miĥailo obstruktis la antaŭeniron de Andrej en Jurievo, la meza punkto inter Vladimiro kaj Perejaslavlo. En 1301 rusaj princoj okazigis kunvenon en Dmitrovo por diskuti pri la problemo de Perejaslavlo. En ĝi partoprenis granda princo Andrej, Tvera princo Miĥailo, Moskva princo Daniilo kaj Ivano de Perejaslavlo. Andrej kune kun Miĥailo kontraŭstaris al Daniilo kaj Ivano. Dum Miĥailo postulis iujn rajtojn je Perejaslavlo, same kiel Andrej, Ivano montris favoron al Moskva princo Daniilo (Fakte, Daniilo akiris Perejaslavlon post la morto de Ivano).

Post la princa kunveno en Dmitrovo, rimarkinde etendiĝis teritorie Moskva princregno, kiu antaŭe ne estis eminenta. En nur kelkaj jaroj Moskva princo Daniilo anekciis Kolomnon, Perejaslavolon, Moĝajskon. Moskva princregno etendiĝis ĉiuflanken kaj kontrolis bazan teritorion de centra Rusio, ĉar Kolomno situis sudoriente, kaj Perejaslavlo nordoriente, kaj Moĝajsko norde de la urbo de Moskovo.

Granda princo Andrej malkontentiĝis je tiu rapida etendiĝo de Moskvo, kaj iris al la ĥanregno en 1303, kaj manifestis sian malkontenton al Toĥtao. Do Toĥtao farigis rusajn princojn kunveni en Perejaslavlo en 1304. En tiu kunveno partoprenis

granda princo Andrej, Moskva princo Jurij (la plejaĝa filo de Daniilo, Daniilo mortis rekte antaŭ tiu kunveno), kaj la sendito de Toĥtao kaj episkopo Maksimo.Estis legita la "jarliko" de Toĥtao postulanta la ĉesigon de princaj konfliktoj.Kaj al rusaj princoj estis manifestita la forta volo de Toĥtao postulanta la politikan stabiligon de nordorienta Rusio. Rusaj princoj aprobis la aldonon de Perejaslavlo al Moskva princo Jurij, ne al granda princo Andrej.

Kiel tiuj okazintaĵoj montris, Toĥtao pli energie intervenis je la rusa politiko ol antaŭaj ĥanoj. Li planis aboli la tronon de Vladimira granda princo kiel "la plejaĝulo de ĉiu Rusio" kaj igis ĉiujn rusajn princojn siaj rektaj vasaloj. Kaj li planis fondi rusan princan kunvenon kun la prezidanto de la ĥanregna grandulo kiel mediacian organizaĵon de princaj konfliktoj. Sed kiam li mem venis al Rusio por plenumi tiun planon, survoje li mortis en 1313.